



LA JUNA VIVO

OFICIALA MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO“

Redakcio kaj Administracio: TJO-Centro, West-Grafdijk (NH), Nederlando
 Ĝironumero 382363 Jarabono 3 guld. aŭ egalvaloro

AL LA 15.XII (Libroj kaj homoj).

En tago Zamenhofa, aŭ kiel volas aliaj, en tago de libro, ĉiuj libroj ĝojas. Hodiaŭ venis horo de nia liberigo. Decidiĝos sorto nia senhejmula. Venis niaj savontoj kaj ni el la ombro eniros la mondon vastan, luman Oni legos nin, laŭdos!!

Tiaj estas revoj de libroj en la tago Zamenhofa. Sed ilia ĝojo estas same neegala kiel tiu ĉe homoj.

Libro malkara trovas aĉetanton, havas sukceson pli rapide ol libro kara, pli valora. Tiu ĉi lasta longe atendos sian savonton. Same — homo.

Ju pli malkara, ju pli malgranda li estas, des pli rapide kaj pli alten grimpas li sur la socia ŝtuparo.

Kaj inverse: homo meritplena, homo grandkora, homo vere kara, longe atendas ĝis oni lin ektaksos kaj ekstraktos laŭvalore. Tre ofte eĉ la vivo ne sufiĉas por tio. Oni devas morti por ricevi la aŭreolon de gloro kaj — pompan florkronon sur la tombo. Do, ŝanĝante vortojn de la proverbo, kiu diras, ke „Pli bone malfrue ol neniam“, mi diras: „Pli bone frue ol post morto.“

Kaj mi proponas: aĉetu po unu libro malkara kaj unu kara, por ke tiu lasta ne atendu ĝis morto, t.e. ĝis sia malaktualiĝo. Hodiaŭ ni estas plenaj de profunda meditado pri tiu, kies valoron kaj meritojn por la homaro ni ekkomprenis nur post lia morto.

Libroj malaktualiĝas, homoj plej ofte — same, sed Esperanto kaj ĝia aŭtoro restos ĉiam aktualaj, ĉiam karaj al la esperantistaro, venonte — al la tuta homaro. Ĉiu jaro, ĉiu nia universala kongreso estas unu laŭro pli en la granda laŭrokrono, kiu kvazaŭ aŭreolo de senmorteco radias ĉirkaŭ Lazaro Ludoviko Zamenhof.

Memoro pri li estas monumento pli impona, pli daŭra, ol la granito malvarma sur lia tombo.

El „Verkoj de FeZ“¹⁾.

¹⁾ FeZ estas d-ro Felikso Zamenhof, frato de d-ro L. L. Zamenhof. Li naskiĝis en 1868-a kaj mortis la 4-an de decembro 1933-a.

Ĉiu, kiu sendas 1 guld. (aŭ 5 resp. kup.) al la Libro-Servo (Hof v. Delftlaan 79, Delft, Ned.) ricevos 10 diversajn Esperanto-gazetojn!

Ĉu Danlando estas la ĉefurbo de Svedujo? Oni efektive povas trovi homojn, kiuj tre serioze demandas pri tio. Nu, la lando ja ne estas tre granda kaj tie ne loĝas multaj homoj.

Kiom granda vi pensas? 1) Kaj kiom da homoj loĝas tie? 2) (vidu malsupre).

Ĉu estas montoj en Danlando? Ne, la plej alta amaso da tero atingas nur altecon de 173 metroj super la marnivelo. „Himmelbjerget” (la ĉielmonto), kelkaj eble tuj diras. Sed vi eraras. Ĉi tiu plej konata teramaso tamen ne atingis la plej grandan altecon. Nur 147 metrojn. Sed rilate al beleco: ĝi ja ne estas esprimebla per cifero. Ne, Danlando estas malalta lando kaj konsistas el JUTLANDO (Jylland), la duoninsulo, kies suda limo tuŝas Germanujon, kaj 109 loĝataj kaj 382 ne-loĝataj insuloj. La plej granda insulo nomiĝas SELANDO (Sjælland) kaj sur ĝi situas la ĉefurbo KOPENHAGO (København) kun 1 miliono da loĝantoj. La dua estas FUENO (Fyen), sur kiu vi trovas ODENSE, la tria urbo laŭ grandeco. ÅRHUS estas la dua urbo kaj situas sur JUTLANDO, meze sur la orienta bordo. La lando estas terkultura kaj la fekundajn kampojn vi trovas en la orientaj partoj de la lando, t.e. la insuloj kaj la orientaj marbordaj regionoj de JUTLANDO, dum la okcidentaj partoj de JUTLANDO ĉefe konsistas el sabla tero (erikejo), kiun nur intensa kulturado faris ekspluatebla.

El la kvar milionoj da enloĝantoj vi trovas 1 milionon en Kopenhago, 1 milionon en la ceteraj urboj kaj 2 sur la kamparo.

La konstitucia kodo diktas jene:

Reĝimo. — 1. La reĝimo estas limigita monarkio. La potenco de la reĝo estas hereda 2. La leĝdonan potencon havas la reĝo kaj la parlamento kune. La plenuman potencon havas la reĝo. La juĝa potenco apartenas al la tribunaloj 3. La evangelia-Lutera eklezio estas la dana popoleklezio kaj kiel tia subtenata de la ŝtato.

Depost 1814-a instruado estas deviga en Danlando. La devo inkluzivas ĉiujn infanojn inter 7 kaj 14 jaroj, sed la gepatroj povas libere decidi kiel plenumi la devon zorgi pri la edukado de siaj infanoj, ĉu per propra instruado, ĉu per aliĝo al privataj aŭ publikaj lernejoj. Granda plimulto deziras aliĝi la infanojn al publikaj kaj senpagaj komunumaj lernejoj. El 414.000 infanoj en la lerndeviga aĝo nur 428 estis instruataj hejme, 32.000 en privataj lernejoj kaj 380.000 en komunumaj lernejoj. La ceteraj, ĉ. 12000, aŭ ankoraŭ ne aliĝis, aŭ ne estis instruataj pro malsano k.s.

Proksimume 25 % el la infanoj vizitas la ekzamen-lernejojn kaj ĉiujare preskaŭ 3000 lernantoj trapasas la abiturientan ekzamenon kaj tiel

Respondoj: 1) 42.931 km²; 2) 4 milionoj.

havigas al si la rajton daŭrigi sian edukadon ĉe la sciencaj institucioj.

Ekzistas du universitatoj, unu en Kopenhago kaj unu en Århus.

Se vi intencas (ĉu ne?) viziti Danlandon en la venonta jaro, mi tre forte volas rekomendi al vi legi la libreton FAKTOJ PRI DANLANDO.

Ĝi tre koncize rakontas al vi per teksto kaj bildoj pri la lando de la venonta internacia junular-kunveno. Informiĝu pri ĝi ĉe via landa libroservo aŭ mendu ĝin ĉe la libroservo de T.J.O.

Kaj Pedersen.

KRISTNASKA KANTO (el la germana lingvo tradukita de H. Hölzemann).
(Melodio laŭ sicilia popolkanto).

(La ciferoj sub streko signifas okonajn notojn. La antaŭa kvaronmoto devas esti plilongigata je okono, kion indikas la punkto sub la streko. La punkto kaj cifero sub la streko do kune ampleksas la duan pulson).

1 = D (aŭ C) 4/4.

5 . 6 . 5 . <u>4</u> 3 4 5 . 6 . 5 . <u>4</u> 3 4 5 . 5 .
Ho, ĝo- ji- ga, fe- li- ĉi- ga, gra- co-
6 . 7 <u>1</u> 7 . 6 . 5 . . 0 2 . <u>3</u> 2 3 4 . <u>5</u> 4 .
ple- na krist- nas- ka temp'! Mon- do per- di- ĝis,
3 . <u>4</u> 3 4 5 . <u>6</u> 5 . <u>1</u> 7 6 5 <u>1</u> 6 5 4 3 . 2 . 1 . . 0
Kri- sto nas- ki- ĝis. Ĝo- ju, ĝo- ju nun, ho, kri- sta- nar'!

1.

Ho, ĝojiga,
Feliĉiga,
Gracoplena kristnaska temp'!
Mondo perdiĝis,
Kristo naskiĝis,
Ĝoju, ĝoju nun, ho, kristanar'!

2.

Ho, ĝojiga,
Feliĉiga,
Gracoplena kristnaska temp'!
Kristo alvenis,
Pekon forprenis,
Ĝoju, ĝoju nun, ho, kristanar'!

3.

Ho, ĝojiga, (k.t.p.)
De anĝelhoru
Sonas adoro.
Ĝoju, ĝoju nun, ho, kristanar'!

Korekto: En „Gaja Kanto” (n-ro 2) mankas en la 13-a takto daŭriga punkto. Oni metu tian punkton inter la du ciferoj 7. — En la piednoto estas menciata nekonata muzikilo: kordiono. B.v. legi: akordiono.

De J.

**
*

Al ĉiuj niaj legantoj ni deziras feliĉan Kristnaskon kaj bonan Novjaron!

UNIVERSITATA VIVO (Registriĝa marĉandado).

En „La Juna Vivo” mi legis artikolojn pri Brazilo, pri Aŭstralio, pri ŝipoj, pri festotagoj en diversaj landoj, sed neniam pri la unika usona marĉandado, kiu nomiĝas „universitata registriĝo”.

Por zorge prepari sin, la studento (mi) devas unue akiri por si IBM-kartojn. Por tiu, kiu ne komprenas, kio estas IBM-kartoj, mi klarigos tion. IBM signifas „Internaciaj Komercaj Maŝinoj” kaj tiu kompanio fabrikas i. a. registro-maŝinojn. Tiuj maŝinoj ĉe grandaj komercejoj k.t.p. bonordigas aron da longaj mallarĝaj kartoj, per truetoj en la kartoj. — Ĉe universitato oni uzas la maŝinojn por plikomplikigi la registradon.

Ĉiu studento, antaŭ ol registriĝi, devas plenskribi ok kartojn, metante la saman informon sur ĉiun, sed li ne rajtas uzi skribmaŝinon. La kartoj ne estu falditaj, nek iel ajn makulitaj. Ĝenerale plukas aŭ neĝas dum la registradaj periodoj kaj la kartoj estas tro grandaj por esti kovrataj. En la registrejo, tamen, estas loko, kie oni por malmulta mono, se necese, povas akiri aliajn kartojn.

Kiam oni eniras la registrejon, diversaj personoj disdonas pliajn kartojn kaj du programtabelojn. Nun la ludo komenciĝas. La celo estas kolekti plurajn IBM-kartojn, po unu ĉe diversaj tabloj. Por akiri karton, tamen, ĉiu ludanto (studento) devas marĉandadi. Oni marĉandadas ne per mono, sed per kurshoroj. Mi montros al vi ekzemplon:

Unue oni ĉirkaŭrigardas la ludejon. Estas tabloj apud la muroj kaj super ĉiu tablo estas granda afiŝo, kiu nomas la marĉandebajn kursojn de tiu tablo. La tabloj estas aranĝitaj laŭ granda cirklo, sed ne ĉiam la kursoj de tablo akordas kun la nomo supre skribita.

Oni serĉas la nomon de kurso, kiun oni studos. (Oni jam antaŭe diris, kiuj ili estos). Post longa marŝado laŭ la cirklo, oni trovas eble tablon, kies afiŝo diras: „Hispana lingvo”. Dezirante studi la hispanan lingvon, la studento ekstaras en longan vicon, esperante, ke veninte al la tablo, oni ne eltrovas, ke ĝi estas la vico por la franca lingvo. La vico malrapide movas sin kaj oni rimarkas, ke kvankam ses registristoj sidas malantaŭ la tablo, kvin el ili legas gazetojn. La vicoj por la itala kaj portugala lingvoj fariĝas unu ĉe la tablo. Ĉu eble jen nova lingvo: „italga?” Plue oni vidas, ke la vico sub la afiŝo „Latinidlingvoj” ŝajnas stari ĉe neokupita tablo.

Sed oni ne permesas marĉandon ĉe la hispanlingva tablo.

„Nomon”, diras la viro.

Oni diras la nomon. La viro skribas ĝin kaj kursnomon, horon, lokon sur karton, donas unu plian IBM-karton kaj — fino. Tio estas malesperiga. Post tiom longa atendado ne plaĉe estas ne povi argumentadi.

Do oni iras al la „Matematik”-afiŝo. Tie ne estas vico kaj oni povas paroli rekte al la registristo.

„Mi deziras matematikon 8”, oni diras.

„Certe”, diras la viro, „Ĉu eble lunde-merkrede-vendrede je la 11-a?”

„Nu, fakte mi deziris posttagmezan horon, se eble. Ĉu f-ino Cole ne instruas posttagmeze?”

„Ŝi ne plu instruas.”

Sed oni persistas: „Ŝi diris, ke ŝi ja instruos ĉi tiun kurson en la posttagmezo.”

„Nu, oni decidis alie.”

„Mi deziras anglalingvan kurson je tiu tempo. Ĉu ne estas akirebla alia horo?”

„Ho jes, certe. Je la 9-a, marde-ĵaŭde-sabate.”

Tio malplaĉas. Oni ne deziras sabatajn klasojn. „Ĉu ja neniu alia horo estas ebla?”

La viro serioziĝas, rigardas la tabelojn kaj flustras: „Jes, ja estas, je la 9-a, lunde-merkrede-vendrede, sed vi ne deziras ĝin. Mi ne volas doni tiun horon. La instruisto estas tre malbona. Ne, mi ne donos tiun.”

Oni konsideras. Oni ja deziris tiun anglalingvan kurson je la dekunua.

„Komprenu, iu instruisto instruas nur unu klason kaj tio estas je la 11-a. Mi ja volis partopreni ĝin.”

„Nu, vi povas havi la alian kurson je la 9-a, m-ĵ-s.”

„Tion mi ne volas. Mi supozas, ke mi devos akcepti tiun je la 11-a.”

La viro tion skribas kaj adicias al la kolekto plian IBM-karton.

Religio-klason oni facile akiras je la dezirata tempo: la 2-a kaj la 15-a posttagmeze. Kaj oni nun batalas por la diskutklaso-tablo. Super la tavolo estas tri afiŝoj: „Diskutklaso”, „Ĵaŭde-marde”, „Merkrede-vendrede”. Sub tiu lasta estas nesurskribita afiŝo, kiu devus montri (oni poste eltrovas) per sagoj la viron, kiu prizorgas matenajn klasojn kaj la viron kiu prizorgas posttagmezajn klasojn. Tamen, ne gravas, ĉar la vicoj intermiksiĝas kaj malfacile oni evitas veni al la filozofi-tablo.

Atinginte la malĝustan viron kaj irinta al la alia, oni flustras, ĉar kvankam diskutklaso okazas ĉiuhore, bonaj horoj estas malmultaj kaj estas tradicio ke oni malofte povas ricevi la deziratan bonan gvidiston.

„Ĉu eblas akiri horon de f-ino Fields?”

La viro sulkiĝas la frunton kaj sekrete rigardetas tabelon. Poste li kaŝe kapjesas kaj provante ŝajnigi ke li eltiras kartojn de aliaj instruistoj, li kaŝe tiras el malgranda aro karton kun la surskribo: „F-ino Fields”.

„Ĉu je la” li diras laŭte, por forigi iun suspekton de aliaj. Subite li malatigas la voĉon: „9-a?”

Oni kapjesas. Li rapide skribas nomojn, donas IBM-karton kaj oni foriras, dum li ridetante klopodas igi iun akcepti klason je la 8-a, ĵaŭde kaj marde.

Restas nur nun plia loko: la angla lingvo. Oni tie jam klopodis, sed ili rifuzis pridiskuti horojn ĝis nun. La starado tie daŭras longe kaj regule venas famoj, ke la vico fakte kondukas al rusingvaj klasoj, kies registristo dormas ĉe alia tavolo. Aliaj famoj diras, ke ĉiuj bonaj klasoj jam delonge ne plu estas haveblaj. Fine oni atingas la tablon.

„Ĉu eble je la unua kaj dek kvin, lunde-marde-vendrede?” oni demandas.

La viro krias: „Jes, certe!” kaj rapide skribas tion, donacas IBM-karton kaj oni foriras.

Restas nur pagi, disdoni la IBM-kartojn kaj jam estas finita la registriĝo. Ĉu nur??? Tio ja postulas la plej longan tempon. En la hodiaŭa mondo de IBM-maŝinoj oni devas zorge atenti la disdonadon. Ĉe longa tavolo oni donas la jam grandan kolekton de IBM-kartoj al la unua sekretario, kiu trarigardas ilin kaj redonas. Post kvin minutoj oni atingas la duan sekretarion, kiu forprenas unu karton. Tion oni faras ĉe ok sekretarioj. Kial ili devas uzi tiom da tempo por inspekti la kartojn, oni ne scias. La naŭa sekretario skribas monpostulon kaj transdonas ĝin.

Mi ne rakontos pri la postaj okazaĵoj, ĉar ili konsistas el atendado ĉe centoj da lokoj, kie oni trovas, ke ĉiuj kalkuloj estas misskribitaj, k.t.p.

Kaj finfine oni denove estas libera! Oni eniris je la 8-a kaj duono kaj eliras je la 1-a kaj duono posttagmeze. La laboro estas finita, nun oni povas feliĉe atendi (serĉante la kurslokojn) ĝis la sekvonta registriĝo. Tio okazos post 4-6 monatoj. Plej strange, oni neniam povas klarigi, kial la sinjoroj ne uzas la samajn IBM-kartojn por la registriĝo, tiel plirapidigante la aferojn. Sed kompreneble, ĉu oni iam aŭdis pri universitataj estroj, kiuj zorgas pri alies tempo?

Donald R. Broadribb.

Militrifuzado (responde al la artikolo en la antaŭa n-ro).

La principo „militrifuzi” estas, laŭ mi, tute elstara rajto por demokrata mondo. Ĝi postulas, ke la rifuzanto zorge agu laŭ sia celo.

Se junulo rifuzas militservi, ĉar lia celo estas eviti eventualan murdon de homa frato, li pravus.

Se li opinias, ke li devas militrifuzi pro la fakto, ke eble malamikoj de lia patrolando estas al li simpatiaj, la problemo estas tute alia. Estas la, ĉie konata, problemo de la „Patrolando”: ĉu oni ĉiam senkonsidere devas fari ĉion por la lando kie (neniu kontraŭos tion) oni naskiĝis tute hazarde? (Mi estas franco, ne germano. Se mi estus granda propagandisto por mia franca registaro, mi estus estinta en Germanujo kaj, granda amiko de l' reĝimo, post la milito milita krimulo, mortigota!)

Tiam la problemo estas plej grava. Kaj mi povus konkludi: kiu opinias sian patrolandon posedanto de ĉiuj rajtoj, tiu devas militservi (almenaŭ senbrue); kiu diras: „mia patrolando estas la tuta tero!”, tiu devus, bonkonsidere, ĉiam militrifuzi, ĉar neniu moralo iam permesis, pro iu ajn kaŭzo, diri al frato: „Vi, malamiko de nun, mi murdu vin”

Supre mi skribis „tiu devus”, sed laŭ la cirkonstancoj la situacio ŝanĝiĝas. Mian propran ekzemplon mi notos, kvankam ĝi ŝajnas al la malbondiremuloj timema solvo:

La venontan jaron la franca leĝo vokos min, dek naŭ-jaran junulon, al militservo. Mi jam respondos vian demandon: „Mi iros”, ĉar, kvankam mi opinias la tutan mondon mia frataro, kvankam mi neniam malŝatos militrifuzantojn, ĉu francajn, ĉu alilandajn, malgraŭ ĉi tio, mi opinias ke estos pli facile por mi libere (soldato ja ĉiam havas la eblecon senriske interkontakti kun civiluloj) labori por la paco, ol paroligi ĉiujn gazetojn pri nova militrifuzanto, dum kelkaj monatoj en malliberejo. Nenion faras tiuj, kies manoj estas ligitaj.

Jean-Louis Texier.

Bicikloflagetoj: 0,75 guld.; Insignoj: 0,75 guld.; La ĝironumero de la TJO-Libroservo estas 570720!

..... „Mi gratulas vin pro la bona enhavo de la novembra numero de nia gazeto, en kiu estus bone, ke oni daŭrigu tiel praktiki temojn kaj problemojn de la nuntempa junularo kaj ricevi opiniojn el diversaj landoj. Kiam mi havos iom da tempo, mi skribos al vi kelkajn vortojn pri la „militrifuzado“.

Aliparte, mi proponas, ke regule aperu en LJV rubrikoj pri la vivo de la studentoj kaj la junaj laboristoj, kiuj ebligas al ni objektive juĝi pri la situacio en diversaj landoj, de kie ni ricevas informojn.

Estus bone ankaŭ, ke ni havu kulturalan rubrikon (beletristiko, muziko, arto, k.a.), de temp' al tempo

**
*

Jen la voĉo de juna franco. Pluraj aliaj esprimis sian kontentecon pri la novembra n-ro kaj samtempe la deziron havi pli da diskutotemoj.

Sed — responde al la artikolo pri militrifuzado ĝis nun (la 1-an de dec.) venis nur unu reago. Geamikoj, tio ne sufiĉas. Ni bezonas pli da reagoj, verkajojn pri aktualaj temoj, mallonge: *vian* aktivan kunlaboron! Nur tiam nia gazeto estos vere interesa! Se vi ne mem povas verki, do traduku interesajn artikolojn! Ĉu ni povas atendi viajn leterojn? Red.

El la Montmartra — kaj Esperanta — kabareto „La Tri Koboldoj“.

1.

Du ĉasistoj tre fervoraj
Diskutadis. Kaj la temo
Estis certe plej bonmora,
Ĉar ĝi estis ja ĉas-temo!

2.

Matematikulo sprita
Ŝatis tre muzikan ritmon.
Estis li de ĝi logita.
Kial? Pro la loga ritmo.

Mihaelo, Parizo. (Kopirajto rezervita).

ĈU

via abonon finiĝas per ĉi tiu n-ro? ¹⁾

Se jes, do bone atentu: Kiel ni jam pli frue anoncis, nia administra jaro nun iras de septembro ĝis septembro. Ni tial afable petas vin pagi de 1/1-1/9' 52 (do 2 guld. aŭ egalvaloron). Tiam ĉiu(j) je la 1-a de septembro '52-a pagu por la nova administra jaro. Tiel ni evitos, ke oni ne scias kiam pagi, kiel ĝis nun ofte okazis.

Se vi ne deziras daŭrigi *vian* abonon vi bonvolu poŝtrevene informi nin pri tio. Komprenu ja, ke ĉiu ekzemplero de LJV kostas sufiĉe da mono. Kaj nia kotizo estas tiom malalta, ke ĝi apenaŭ sufiĉas por kovri la kostojn! Do — se

¹⁾ Tiu, kies abono finiĝas vidos ruĝan X-signon sur la banderolo).

vi povos pagi iom pli ol la fiksitajn kotizon, nia kasisto estos al vi tre, tre, tre danka!!!

Pro la kurzoŝanĝiĝo ni bedaŭrinde devis fiksi la kotizon por **Aŭstrujo** nun je 25 ŝ. jare. — Por la aliaj landoj oni vidu la liston de perantoj kaj kotizoj en la julia/aŭg. n-ro '51.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Ĉeĥoslovakujo: Kiu samideano dez. interŝ. gramofondiskojn (ĉiuspeca muziko). Respondo certa. M. Vondruška, Jihlava, Malinovského 37.

Danujo: 5 danaj knabinoj (11-16-j.), komencantinoj, dez. kor. k. gejunuloj, kiuj intencas viziti la junularkongreson venontsomere en Danlando. Adresu leterojn al: Gudrun R. Jensen, instruistino, Aalstrup, Faling.

Francujo: Geinstruistoj (ambaŭ 29-j.) dez. kor. kun junaj geinstruistoj (geedzoj). Ges-roj Bernard, Dirac (Charente).

Germanujo: 20 geesperantistoj (16-24-j.) serĉas korespondadon k.l.t.m. Resp. certa. Hubert Ringbeck, Köln-Sülz, Redwitzstr. 12.

Japanujo: 16-j. lernanto dez. kor. pri lernejoj kaj poŝtmarkoj. Juniĉi Sindo, 1-17 Kaminarimon, Asakusa Taito-ku, Tokio.

Kanado: M. Frense (8, Thörlweg, Hamburg-Harburg, Germ.) nun loĝas Firm Spruce Fells Power & Paper Co., Camp 34, Kapuskasing, Ont., Kanado. Li salutas ĉiujn geamikojn kaj petas korespondaĵojn al sia nova adreso.

Nederlando: Mi dez. por 40 infanoj, 11-13-j. interŝ. il. poŝtk. kun ĉiuj landoj. F-ino M. Renooy, B. Bottemanneplein 2, Alkmaar.

Usono: Gelernantoj, 13-15-j. dez.kor. pri ĉiuj temoj per let. kun samaĝuloj en ĉ.l. Robert Alberg, Eastern Junior High School, Lynn, Massachusetts.

La grupo en Birmingham (Britujo) invitas ĉiujn partopreni Esperantan semajn-finon (ĉe Barnes Close) la 17-an kaj 18-an de majo 1952-a. Skribu petante informon al: F-ino Nixon, 183 Woodlands Park Rd., Bourneville, Birmingham 30.

PASKA LERNEJO de S.B.E.T. okazos en Folkestone de la 12-a ĝis la 19-a de aprilo 1952-a. Kostoj de £ 5-5-0 ĝis £ 6-6-0, plus enirpago de 5 ŝ. Informojn oni petu al F-ino Nixon, 183 Woodlands Park Rd., Bourneville, B'ham 30.

Por la venontjara nacia kongreso de la italaj Esperantistoj (6-9 sept. 1952-a) en Bologna, oni intencas organizi ekspozicion de esperantaĵoj: libroj, gazetoj, broŝuroj, afiŝoj, salutkartoj k.t.p. Oni estas petata sendi materialon (almenaŭ salutkarton) al: Esperantista Grupo „A. Tellini”, Bologna, Via Borgonuovo 16, Italujo. Ĉiu sendaĵo estos rekompencata per esperantlingva turisma faldfolio.

Jarlibro de U.E.A. 1951, dua parto, kun listo de lernejoj kie Esperanto estas instruata, resuma raporto de la progresoj de Esperanto dum la pasinta jaro kaj informoj pri la novaj kotizoj. Liverata nur al individuaj anoj de U.E.A. Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo.